ĝis revido




ĈIPAGE | LA HEROA PLACO EN BUDAPEŜTO
FOTIS | RUSS WILLIAMS



1 MONATO TRA ESPERANTIO

# MOMENTO!



#08 PRINTEMPO2005

brazilaesperantistajunularaorganizo BEJO




ĈIPAĜE | ZAMENHOFA BUSTO EN BUDAPEŜTO, IOM MODERNE ORNAMITA





# MOMENTON!

#08 PRINTEMPO 2005



Re-saluton, karaj legantoj!

Unue mi devas pardonpeti ke la temo de la nuna revuo tiom similas al la antaŭa. Sed okazas ke kiam ni pretigis la pasintan revuon, ni tute ne imagis ke ankaŭ ni povus same havi la oportunonpartopreni en eksterlandajn aranĝojn. Aperis konkurso de TEJO por partopreni IJK-n.Mi aliĝis kaj jam iom planis por la okazo ke eble mi iros. Kaj kiel ĉiam okazas, la planoj neniam funkcias. Ĉi-somere en Eŭropo okazis neordinara sinsekvo da renkontiĝoj en proksimaj landoj. Kaj ĉi-jare oni celebris la 100 jariĝon de la unua UK en Bulojne ĉe Mar'. Do, estis iel speciala jaro.La sinsekavaj renkontiĝoj estis: KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) en Helsinki, Finnlando; UK (Universala Kongreso) en Vilnius, Litovio; IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Zakopane, Pollando kaj IJS (Internacia Junulara Semajno) en Vác, Hungario. Do, mi diris al mi mem, se mi iros, mi ne stultu kaj partoprenu unu solan aranĝon kaj revenu... Mi profitu kaj partoprenu pliajn!

La respondo de la konkurso alvenis malfrue kaj mi havis nur 2 semajnojn por ĉion plani, kien iri, kiel iri, kiam reveni ktp. Certe mi ne torturos vin per milpaĝa taglibro (kvankam ne mankus temo!), sed en ĉi tiu eldono mi dividas kun vi miajn plej interesajn travivaĵojn. Pro tiu vojaĝo, mi ne povis partopreni en la ĉi-jara BEJK, kiu estis unu la plej sukcesaj lastatempe.La taskon raporti pri ĝi prenis (malgraŭ multaj provoj eskapi) samideano Hilbernon el Fortalezo/CE. Ankaŭ vi povos legi la lastan parton de la artikolo pri Esperanto kaj Intereto kaj konatiĝi kun fama komputila ludo, kiu estis ĵus tradukita en Esperanton. Ni estas ĉiam pli kontentaj liveri al vi kvalitan revuon, kaj strebas pli kaj pli plibongi ĝin. La partopreno de ĉiuj estas gravaj, kaj ni invitas vin (jes, CI MEM!) sendi vian kontribuojn al la nova retpoŝto de MOMENTON ĉe gmail. Ĝis relego!

*Roĝener Pavinki*
*ĉefredaktanto*

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO.
**REDAKTADO** kaj **ARTO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.
**ARTO** kaj **PRILABORADO** | Roger Borges, Madrid.
**SUPERRIGARDO** | Ísis Okabe Piton, Campinas.
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas.
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP BRAZILO

**momenton@gmail.com** **www.esperanto.org.br/bejo**

# INTERRETO KAJ ESPERANTO >>>

## 3.0 DISVASTIGADO

Daŭre, ni iru al la tria kaj lasta subtemo de tiu ĉi artikolo: disvastigado. Interreto estas bonega medio por diskonigi iujn ajn aferojn; se vi volas sciigi ion al la mondo, simple faru retpaĝaron pri tio. Sed por vere disvastigi la ideon de Esperanto tra la mondo, oni devas prefere elekti naciajn lingvojn, por tiel atingi la nekonantojn pri la internacia lingvo. Tamen la Esperantaj retejoj estas same gravegaj por montri, ke Esperanto jam estas tiom uzata - samtempe helpante ĝian kreskadon.

Por ekhavi profesian retpaĝaron, oni prefere elektas profesiulojn por prizorgi ĝin. Tamen tio postulas monon, kiu ne ĉiam sufiĉe disponeblas. Aliflanke, ekzistas multaj senpagaj servoj en interreto. Por uzi ilin, vi devas konscii pri iliaj limigoj kaj postuloj. Kaj eĉ kiam oni kontraktas profesiulojn, oni devas minimume koni ion pri la servo, ĉar tiel oni plibone kontrolas ĝian kvaliton. Tial mi sekvas informante iomete pli pri kelkaj rimedoj por ekkonstrui retpaĝarojn.

Ekzemploj de riĉaj retejoj, kie vi povas lerni kiel konstrui kaj zorgi retpaĝarojn estas la jenaj (en la portugala):
Crie seu Web Site - http://www.crieseuwebsite.com.br
Criarweb = http://www.criarweb.com
Onemagic - http://www.onemagic.net

La unua decido estas pri la adresnomo de la retejo. Ĝi devas esti samtempe simpla kaj montri pri kio temas. Ekzemple, por la hejmpaĝo de Bahia Esperanto-asocio, oni uzis: <www.esperanto-ba.org.br>. Laŭ mi tiu ĉi adresnomo estas bona ĉar enhavas multajn informojn, nome la landon (Brazilo - br), la ŝtaton (Bahio - ba), ĝeneralan kategorion (organizo - org) kaj pri kio temas (esperanto). Por rajti tian ĉi retadresnomon, vi devas provi registri ĝin ĉe specifa organizo, kiu zorgas pri tio. Se vi volas retadresnomon finiĝantan per "br", la nura oficiala organizo, kiu zorgas pri retnomregistro ene de Brazilo estas "RegistroBR". Nuntempe, la kosto por teni retadresnomon tie estas R$ 30,00 jare. Por pli da informoj, vizitu ĝin ĉe http://registro.br



La dua paŝo estas elekti retservon por teni la dosierojn kunmetantajn la paĝaron. Tiuj entreprenoj estas la tiel nomataj retgastigejoj. La prezoj de tiuj servoj multe varias, depende de la spaco okupata de la paĝaro kaj de ĝia trafiko monate. Por publikigi simplan malgrandan retejon, vi povas uzi senpagan gastigejon. Tamen ekzistas malmultaj bonaj tiaj servoj. Lastatempe mi trovis nur du tutsenpagajn angllingvajn ekzemplojn:
Portland Communications - http://www.portland.co.uk/hosting.esp
Abohu - http://abohu.com/package.html

La ĉefa programlingvo uzata por konstrui retpaĝojn estas nomata HTML (HiperTeksta MarkLingvo). Ĝi estas la interna prezento de hipertekstoj, kiuj ebligas montri tekstojn, bildojn, ligilojn al aliaj retpaĝoj ktp. Por krei HTML-an dosieron, ekzistas pluraj faciligaj redaktiloj, kiuj liberigas vin de scioj pri HTML-a kodo. Tamen la kodo kreita ofte ne estas tiom "neta" kaj ĝi nur taŭgas por simplegaj retpaĝoj. Kiam vi volas pli profesian aspekton, tiam vi rekte redaktu la HTML-an dosieron. Nur ekzemple, mi povas montri unu liberan programon por redakti en HTML:
FastHTML - http://www.fasthtml.com.br

Kelkaj konsiloj pri la estetiko de la paĝoj estas:
- Vi ne uzu tro kontrastajn kolorojn en ĝia teksta parto, ĉar tio ĝenas la okulojn de la legantoj;
- Vi metu la alineojn iom apartigitaj, por faciligi la komprenon de sinsekvaj ideoj;
- Vi ne uzu larĝajn liniojn, ĉar tio lacigas la okulojn de la legantoj.

La lasta paŝo estas aperigi vian hejmpaĝon al ĉiuj, kiuj serĉas informojn rilatajn al ĝi. Por fari tion, vi devas enmeti sugeston pri via hejmpaĝo en interretkatalogoj kaj en pluraj serĉiloj. La plej konataj katalogoj estas:
DMOZ (Portugale) - http://dmoz.org/World/Portugu%c3%aas/add.html
DMOZ (Esperante) - http://dmoz.org/World/Esperanto/desc.html
Yahoo (Portugale) - http://br.yahoo.com/publicidade/search_products.html

La serĉilo Guglo estas la plej konata nuntempe kaj ĝi multe uzas la datumbazon de la katalogo DMOZ, antaŭe montrata. Sed estas bone, ke vi rekte rekomendu vian hejmpaĝon al diversaj ceteraj retserĉiloj. Multajn el ili vi trovas tie ĉi (en la portugala lingvo):
http://www.crieseuwebsite.com/buscadores.shtml

Lastvorte, mi devas atentigi vin, ke mi nur tuŝetis la temon pri interreto. Se vi sukcesis alveni ĝis ĉi tie, do vi ankoraŭ apenaŭ ekkonas la nenombreblajn rimedojn disponigatajn de la Interreto!

**KONTRIBUIS** | FELIPE CASTRO (NATAL/RN)



# KEF >>>

## KULTURA ESPERANTA FESTIVALO

Fama brazila rokgrupon "Titãs" kantas: "Ni ne volas nur manĝon, ni volas manĝon, amuziĝon kaj arton". Ja ĉion ĉi mi trovis en KEF 2005 ĉi-somere en Helsinko, la bela ĉefurbo de Helsinko.

Ne nur pro tio ke la manĝo estis inkluzivita en la aliĝo, sed ankaŭ pro tio, ke arto kaj amuziĝo estis nia ĉefa plado dum KEF. Kaj mi devas konfesi ke neniu malsatis dum tiu semajno. Tute male, tiam renkontiĝis homoj, kiuj uzas la internacian lingvon laŭ la plej ĝua maniero: belarte!

La animsatigaj pladoj venis el pluraj mondopartoj, tiel ebligante al ĉiuj krom ĝui tre varian programeron, ekkoni artistojn kiuj ne ofte venas al Esperanto-aranĝoj...

Arto por aŭskulti, legi, pripensi, danci, kanti kaj ĝui. Partoprenis peskaŭ ĉiuj aktivaj E-artistoj. Dolchamar, la 'hejma valoraĵo' prezentiĝis dufoje, elektre kaj akustike.

Elektre ili tre rokas nun, kaj estis la plej verva grupo. Akustike, ili fakte nur anstataŭigas la elektran gitaron per akustika kaj faras la saman spektaklon. Pli bone por ni, kiuj povis dufoje ilin spekti.

Ĵomart kaj Nataŝa ne koncertis nur en Liberté (urba klubejo kiu fariĝis nia dua ĉarma ejo, kien ni ĉiun 'helan' nokton iris por spekti la koncertojn! kaj kiaj koncertoj!). Ili ludis ĉie en la KEF-ejo. Karina, ilia filino, brile kunkantis kaj ja estas pruvo ke talento verŝajne havas ankaŭ genetikan influon!

Estis aparta sud-amerika etoso en ĉi tiu KEF. Flavio Fonseca kaj Alejandro Cossavella respondecis pri ĝi. Al la koncerto de Flavio venis homoj en Helsinko por spekti. Li plurfoje estis petata de pluraj kantistoj kiuj deziris lerni kiel ludi sambon!
Alejandro Cossavella kontentige suprprizis ĉiujn ĉar multaj estis aŭdintaj liajn kanzonojn antaŭe, tamen li unuafoje partoprenis en KEF. Videblas ke Artisto li ja estas, tamen tiel bone kiel kantisto li same estas komedianto.

Martin Wiese prezentiĝis sola kun gitaro, sen 'Persone' tamen des pli 'persone'.
Mi ege ĝojas ke almenaŭ trionon de unu el miaj plej ŝatataj muzikgrupoj mi povis spekti. Jomo kaj Liberecanoj koncertis per danciga muzika miksado, kiu laŭ li mem povas esti nomata kiel slavrokenrolo! Esperanto-Desperado, kiu laŭ mi estas la plej 'esperantista' muzikgrupo nuntempa, efike dancigis la publikon! Kaj en la lasta nokto ni povis spekti la UNUSOLAN koncerton de La Porkoj iam ajn !

La nemuzika flanko de la festivalo same estis ege riĉa, per kontribuoj de Jorge Camacho, kiu gvidis interalie atelieron pri poemverkado, rokliriko kaj erotika poezio.

Sten Johansson pri prozoverkado kaj prezento pri krimromanoj i.a. Probal Dasgupta pri recenzarto kaj beletra tradukado k.a.
Arnaŭ Torras ekspoziciis siajn komiksojn, Teatra kaj Opera vespero, Filmodublada konkurso kaj pluraj aliaj prelegoj kaj atelieroj rilate al arto. En "artistoj sinprezentas", kantistoj kaj verkistoj povis klarigi pri siaj verkoj, siaj laboraĵoj kaj respondi demandojn de la publiko!

Estis inspira festivalo de la artistoj kaj spektantoj kune. Ĉiuj kune brilis kaj miksiĝis ke en la fino oni ne plu povis diri kiu estas kiu! Laŭ mi plej pruvas tion kelkaj ekzemploj: La viva karaokeo - mirinda ideo, kiu ebligis al

RAPORTIS KAJ FOTIS | ROGENER PAVINSKI




SUPRE | FLÁVIO FONSECA, NATAŜA, ĴOMART KAJ ALEJANDRO COSSAVELLA

kiu ajn kanti akompanate de kiu ajn, kiu scipovis ludi iun instrumenton.
Do iom hazarde kuniĝis artistoj kaj partoprenantoj por kune improvize ludi. Verdire, rilate al kantistoj, neniu eltrovaĵo aperis, tamen la vespero estis tiel amuza, ke oni devis forpeli nin de la klubejo por fermi ĝin.
La vespero de erotika poezio en kiu Jorge Camacho invitis plurajn partoprenantojn por deklami sursceneje la poemojn, kiuj intertempe neniun ekscitis!

La etoso estis tiom muzika ke ĉiunokte post la koncertoj en la klubejo, muzikantoj kaj muzikistoj renkontiĝis en la ĉefa salono de la ejo kaj improvizis ĝis la noktofin'!

Neforgesebla estis la dublada konkurso - oni dublis filmojn konatajn (aŭ ne) vive dum ili spektiĝis ĉe granda ekrano!
Imagu ke la kunveno de la hobitoj en "la majstro de la ringoj" fariĝu laŭ la dublado estrarkunsido de UEA!

La unusola bedaŭrinda afero estis la manko da partoprenantoj, kiu unuflanke permesis al ni ĝui tre apartan intiman etoson, tamen aliflanke malebligas pli oftajn ĉispecajn kulturaranĝojn, kiu malgraŭ la nerekono de la esperantistaro, tiom multege gravas por la supervivo de la propra lingvo.
Se ni ankoraŭ ne konsumas nek vivas nian propran kulturon, kiel ni provas ĝin proponi al la ekstera mondo?

La noktomeza suno brilegis kune kun la esperanta kulturo ĉi-somere en Helsinko. Ke ni ĉiuj respondecu ankaŭ pri forigo de la nigraj nuboj de la E-kultura ĉielo por ke ĝi daŭre brilu plu.

PS: Mi supozas ke se vi ne ĉeestis... kaj ke post la legado de ĉi tiu artikolo vi ja prave bedaŭras... Tamen bona notico estas, ke baldaŭ venos filmo sur DVD pri KEF 2005!



SUPRE | ĈU ĈIU BRAZILANO DENASKE SAMBAS? IMPROVIZA SAMBO-LUDADO (KEF)






Trairinte la baltan maron ni atingis Estonion, kaj de tie kun esperantistoj kiuj ĉeestis KEF-n ni aŭtobuse vojaĝis al la ĉefurbo de Litovio - Vilnius!

Ĝi estis tre stranga vojaĝo por mi. Estis frumatene kaj kiam la buso trairis landlimojn (de Latvio kaj Litovio) la buso haltis, kaj envenis oficiro, kun armea uniformo kaj neamikeca vizaĝo, kiu kontrolis ĉiun pasporton. Mi ege timis, ŝajnis koŝmaro - Kion mi faru se ili suspektos pri mia tutnova pasporto? Mi scias, ke pro la rasa miksiĝo en Brazilo, nia pasporto estas unu el la plej uzataj de falsigistoj. Ĉar mi jam estis leginta pri homoj kiu estis eĉ arestitaj pro tio, mi ja timis ke mi frumatene devis elbusuĝi fare de tiuj timigaj homoj, kiuj parolas slavajn lingvojn tute nekompreneblajn de mi.

Alia rimarko estas la malgrandeco de tiuj landoj, kaj ĉiuj havas apartan lingvon, monkurzon, ktp. Do por ni alkutimiĝintaj kun la grandeco de Brazilo, malfacilas priatenti tion.
Dimanĉe matene ni alvenis en Vilnius. La GPS-ilo de Marteno (Slovakio) ne plu helpis kiel en Helsinko. Do per busoj ni trovis la UK-ejon, kaj ĉar mi ne estis aliĝinta al ĝi (Fakte mi estis kaj ne sciis... mi rakontos) por mia granda ĝojo la junulargastejo (al kiu ja mi aliĝis) troviĝis tuj kontraŭ ĝi (kaj apud aĉetcentro).

La urbo estis plenplena je homoj kun verdaj ŝildoj ĉie. Eble estis impreso mia, sed mi konfesas ke min suprizis la kvanto da homoj kiuj krokodilis en UK!
Kvankam min ne multe interesis la programo de UK mi partoprenis en unu, TEJO sinprezentas, krom en la nacia vespero kaj internacia verspero (la malfermo kaj fermo mi iom volonte maltrafis).

Kaj kvankam la junularprogramo estis tre eta kaj okazis en aparta konstruaĵo, tie mi pasigis plej grandan parton de mia tempo. Ĉar matene mi devis partopreni nenion, ĉiunokte mi ekdormis ege malfrue.

SUPRE | INTERNACIA VESPERO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO EN VILNIUS, LITOVIO




ĈI PAĜE | LA OFICIALA FOTO DE UK. VERŜAJNE MANKAS DUONO DE LA PARTOPRENANTOJ.

# UK >

Mi havis la rajton partopreni en UK programo, ĉar mi estis unu el la venkintoj de la konkurso de TEJO, sed oni min avertis nur ĵaŭde! Nu, almenaŭ mi gajnis la belegajn librojn, kiuj venas en la UK-valizo :-)

La junulargastejo estis tre ĉarma loko. Estis dancejo, manĝejo, babilejo, ĉambro en kiu ni spektis filmojn.
La uzo de la unusola duŝejo estis ordigita laŭ la horoj. Do ino rajis uzi ĝin dum la malparaj horoj kaj la malinoj dum la paraj.

Estis agrabla surprizo kiam mi trovis sur la kongresa libro foton de mia amiko, brazilano Daniel Haddad. Li eĉ faris muzikajn koncertojn dum la UK. Kaj aliajn brazilanojn mi ankaŭ trovis en tiu fora lando!

La junulara programo min gapis kiam mi vidis, ke estas planita prezento de la punka grupo "Piĉismo".

La respondeculino pri la programo min demandis ĉu mi konas la muzikon de la grupo kaj ĉu ĝi estas bona. Mi respondis: "Nu, ĝi estas brua, ĉu ne? kaj ŝi diris: "Mi ne konas!" Haha. Fakte la koncerto tre malkontentigis min. Ĉar mi ege ŝatas pezan muzikon, sed eĉ tian oni devas scii kiel fari. Kaj verŝajne "piĉismo" jam forgesis tion (aŭ neniam sciis).

Mi faris du tuttagajn ekskursojn, la unuan al Takrai, bela kastelo kiu troviĝas en insulo, akompanata de la fratinoj Indre kaj Haisté kaj Petro! La alia estis bicikla, en parko, kiu kulminis en bela lago!

Ĉar en UK mi estis memzorganto, ege helpis ke tuj apud la gastejo troviĝis aĉetcentro, kie mi ĉiutage en supermarkto aĉetis la manĝprovizojn. Bonŝance troviĝis malmultkostaj italaj fazeoloj por tia brazila malsato!




**SUPRE** | LA AMASLOĜEJO DE LA JUNULARA PROGRAMO





# DUM LA IJK >>>

## POVAS OKAZI (KAJ OFTE OKAZAS) IO AJN!

Per ordinara buso, mi kaj aliaj iris al Pollando - al IJK. Fakte du brazilanoj, inkluzive Daniel, ne estis planintaj veni al IJK, sed mi konvinkis ilin veni! Fakte ĉeestis 8 brazilanoj entute, sufiĉe surpriza kaj granda nombro. Roĝer Borĝes, la diskestro kaj nia kunlaboranto en "Momenton", diskestris dum ĉiuj noktoj.

Zakopane estas eta turisma urbo, montara, tre ĉarma, fama pro la ŝafa fromaĝo, kiun mi kompreneble ne gustumis, hehe. La ejo en la unua tago pli kaj pli plenpleniĝis pro la granda amaso da junuloj kiuj daŭre envenadis! Longa vico formiĝis kaj ni ricevis etan ŝafecan kolsonorilon, kiujn kelkaj insiste portis, sen rimarki ke ĝi ege malkonvenas kiam oni eniras dormoĉambrojn frumatene!

La amasloĝejo estis pli granda ol la kongresejo mem. En ĝi estis tiom multe da homoj, ke ĉiutage mi vidis novajn vizaĝojn, eĉ dum la lastaj tagoj. Tiu IJK estis ege plena, ĉefe de Rusoj (triono de la partoprenantoj!). La programo estas same varia kaj riĉa. Mi mem gvidis unu pri filmado kaj kungvidis alian pri vegetarismo!

Estis pluraj ejoj. Meritas mencion la granda tendo, kiun oni starigis por tie okazigi la plej gravajn programerojn, kiel la malfermo kaj fermo, la internacia vespero
la spetakloj, kaj la konkurso de la "miss IJK", kiu fine ne okazis, pro la atendataj plendoj! Kvankam dum la malfermo la flago falis, la tendo eltenis la pluvegojn kiuj daŭre falis dum preskaŭ la tuta semajno!

Tamen, preskaŭ ĉiuvespere ni havis nebonvenajn vizitantojn, la polico! Oni plendis pro nia laŭta bruado, sed ni estis en lernejo en kies proksima ĉirkaŭaĵo ne ekzistis domoj. En Zakopane, nia laŭta bruo malhelpas la dormon de la ŝafaroj. Post la 10 vespere, ĉiuj devis brui tre malaŭte...

**SUPRE** | LA FALO DE LA FLAGO DUM LA MALFERMIĜO DE IJK

# IJK >

Fakte mi malmulte partoprenis en prelegoj. Mi ja en ĉiuj TEJO-kunsidoj ĉeestis, multege vizitis la supermarkton kaj eble mi plej pasigis la tempon babilante, promentante inter amasloĝejo kaj kongresejo.

La lingva festivalo, planita por okazi en la urbo-centro, fine okazis sub la tendego. Ĝi similis al brazilaj surstrataj manĝ-foiro, kie ĉiu anoncis siajn lingvojn kaj kulturojn kiel legomojn, hehe. JOMO venis poste kaj koncertis. Mirinde li kaj lia gitaro povas sole surpodie dancigi pli ol 300 homojn!

Aliaj koncertoj, kiuj tre plaĉis al mi dum IJK, estis de Espo-Despo, Krio de Morto kaj La Perdita Generacio.

La ekskursoj iris al tri diversaj lokoj. Mi preferis la Tatran Parkon (montara parko) ol Aŭŝvic (la koncentrejo dum la 2ª Mondmilito) aŭ Krakovo.

Tie ni povis multe promeni, sur greso, en malvarma rivereto kaj eĉ en kavernoj!

Estas neimageble partopreni eĉ duonon de la tuto, inter diversaj amuzaj prelegoj, rondoj kaj artaj prezentadoj.
Sed mi ne povis trafi la bonegan teatraĵon de Hennri de Sabates, la postan tagon ni eĉ filmis skeĉon por la venonta eldono de *Volapug'* (kiam mi sukcesos munti ĝin).

Mi revidis multajn amikojn kaj konatojn de pasinta IJK en Brazilo, kiujn ĝoje mi povis renkonti!

Aliajn kiujn konis nur per Interreto kaj finfine povis persone kontakti, kaj la multegajn novajn amikojn, kiujn mi gajnis kaj kun ili spertis neforgeseblajn momentojn!

Kiam IJK finiĝis, ŝajnis ke ankaŭ finiĝis mia aventuro! Mi bedaŭris, ke mi devis adiaŭi multajn homojn de ĉi tiu kaj antaŭaj aranĝoj.

Mi unuafoje sopiris hejmon, sed mi havis ankoraŭ unu semajnon en Hungario...



**MALDEKSTRE |** JUNULOJ SIN BRAKUMAS DUM LA LASTA KONCERTO DE ESPERANTO DESPERADO
**DEKSTRE |** PLURAJ FOTOJ DUM IJS EN HUNGARIO



# IJS, Hungario



La kvara kaj lasta semajno de mia vojaĝo estis IJS en Hungario. Ĉiuj rekomendis tiun aranĝon por mi.
Kiam mi alvenis al Hungario, mi jam estis iom laca kaj sopirantan mian hejmon. Mi supozas ke post grandioza IJK, kie estis junularamaso, mi vere sentis la mankon de homoj kiujn mi konis ĝis tiu parto de la vojaĝo, sed estis oportuno por koni novajn homojn kaj plifortigi amikecojn kun la jam konataj. Tamen estis du amikoj kiuj faris la saman vojaĝon tra la samaj aranĝoj.

Do, por mi, precipe estis ripoziga aranĝo kie eblis ĝui la ĉeeston de amikoj kaj la sunan veteron de Vác.

La ejo estis tre agrabla, la ĉambroj enhavis litojn, kion mi ne spertis de 3 semajnoj, do ili estis tre oportunaj :-)
Sed ne nur sur la lito mi restis dum la tuta semajno - la urbo Vác estas urbeto apud la rivero Danubo, kaj ĝin ni konis pere de interesa urba ludo, kiu promenigis nin tra ĝi.

La ekskurso en Budapeŝto estis unu el la plej interesaj partoj kaj ni povis bone promeni en la urbo kaj reveni al Vác pere de ŝipo laŭ la Danubo. Ĉiuj ni sur la sama ŝipo povis gustumi vinon kaj aŭskulti muzikgrupon vive. Nu, tio estis tre kongrŭa, ĉar la muzikgrupo estis tiom terura ke nur ebrie oni povis komforte vojaĝi. :-)

Ankoraŭ en Budapeŝto ni vizitis la urban planetarion, kiu prezentis belan programon en Esperanto al ni. En la kinejo de Vác ni spektis filmon de la 70aj jaroj dublita en Esperanto.

Estis interese kiel tiom multe da homoj malsaniĝis dum IJS. La gufujo fariĝis la malsanulejo kiu provizis teon kun kurackapabloj por ĉia malsano. Alia ejo kiu havis alispecan funkcion estis la diskoteko, kiu troviĝis tiom for de la drinkejo, ke neniu kuraĝis iri tien.

# IJS >

Mi ĝuis la ludojn, la babiladon kaj la simplajn aferojn de IJS kiel resti en la korto kaj ripozi. Mi konscias ke mi maltrafis kelkajn el la plejbonaj aferoj dum IJS, kiel ekzemple la faman akvobatalon. Sed mi aŭdis ke venis nenio pli ol 3 fajro-brigadistaj kamionoj kiuj ŝpruĉigis akvon sur manpleno da povraj esperantistoj kun akvo-pistoloj.

Mi kaj la aliaj veganoj, kutime iom pli suferas rilate al manĝado ol aliaj. Sed IJS estis aparta manĝado por veganoj, kiu tre bone funkciis plej ofte, tamen (hehe) apartan mencion meritas la vegetarana supo ofertita dum nia ekskurso en fervoja muzeo, estis nur "iomete" da viando en ĝi. La ne-vegetarana enhavis iom pli. :-)

Estis tre aparta kaj trankvila renkontiĝo laŭ mi, kie oni ne sentas sin (tro) kulpa se oni ne partoprenas en la programo.
Mi dankas al la organizantoj kaj al Premio Melinda, kiu ebligis mian partoprenon kaj plian unusemajnan sperton en Esperantio.

Antaŭ ol reveni, mi pasigis posttagmezon en Budapeŝto kaj la nokton en flughaveno por enaviadiliĝi je la 6a matene!
Ne priskrbeblas kion mi portis en la pakaĵoj!

Kial mi entute verkis ĉion ĉi? Mi diros. Estas pro tio, ke homoj ofte prifajfas esperanton. Kaj foje tia sinteno influas sur kelkajn kiuj rezignas pri la lingvo pro tiuj, kiuj mensogas pri ĝi.

Ke ĝi estas mortinta senutila lingvo estas la plej dirata mensogo pri ĝi.

Mi faris tiun vojaĝon pere, pro, kaj por Esperanto, mi ne estis turisto en eksterlando, mi estis unu el la miloj da homoj, kiu renkontiĝis for de siaj hejmoj dum ĉi tiu somero, kaj de tiu sperto naskiĝas amikecoj, kunlaboroj, kaj eĉ amo.

**"La rivero ĉiam fluas oceanen, sed ĝi neniam forgesas la belajn peizaĝojn preterpasitajn dum la vojo"**

## *TURISTO? NE, ESPERANTISTO!*




SUPRE | LA AKVOBATALO ESTIS SKUA VENKO POR LA AKVOBRIGADISTOJ



# 25ª BEJK >>>




En la jaro 2004 mi tute ne pensis vojaĝi al Porto Alegre por partopreni kongreson de esperanto. Tiam la striktaj reguloj de mia universitata kurso kaj la ĉiama manko de mono igis miajn planojn esti tute aliaj, nome resti en Fortalezo kaj senĉese labori la tutan Julion 2005 en hospitalo por infanoj. Sed ĉi tie en Cearao ekzistas iu sorĉisto, tre singulara esperantista sorĉisto, kiu kapablas ŝanĝi eĉ viajn plej neŝanĝeblajn planojn per la plej allogaj argumentoj. Tiu sinjoro en lasta momento oferis al mi jenan proponon: "Mia programo de mejloj ĵus donis al mi tri flugbiletojn por vojaĝi kien ajn ene de Sudameriko. Mi volas, ke vi vojaĝu kun ni al Porto Alegre. Ĉu vi ne volas flugi kun ni? Kion vi diras?"

Bone, jam en la aviadilo survoje al Porto Alegre mi diris, ke pro hasto mi forgesis kunporti mian plej bonan jakon por min protekti kontraŭ la malvarmo. Kaj kia malvarmo! 4 gradoj je nia surteriĝo en la gaŭĉa flughaveno, lunde nokte, la 18an de Julio. Marde mi iris kun la ceteraj cearaanoj al la gaŭĉa montaro. Ni vojaĝis per antikva trajno de Bento Gonçalves trans Garibaldi ĝis Carlos Barbosa. Tio estis vere tre agrabla promeno. Tra la fenestro sin montris al niaj okuloj vinberujoj, mildaj kampoj, akvofaloj, italeskaj vilaĝoj, geknaboj ĝoje nin salutante per mangestoj.

La trajno foje kaj foje haltis en stacidomoj, kie ni havis la ŝancon manĝi fromaĝon kaj trinki bongustan vinon faritajn en la regiono mem. Kompreneble ni ankaŭ multe aŭdis italan kaj gaŭĉan muzikon. Ĉu vi povas imagi cearaanojn dancantajn la "Tarantela"?!

SUPRE | CIRKLAJ DANCOJ DENOVE SUKCESAS EN BEJK

# BEJK >

Merkrede komenciĝis la programeroj de la kongreso. Mi povas nur diri, ke mi multe profitis la saĝajn konsilojn de Pedro Cavalheiro kiel paroli pri esperanto al neesperantistoj. Mi multe lernis pri la historio de Kultura Kooperativo de Esperantistoj aŭdante Jair Sales, Aloísio Sartorato, Givanildo Costa kaj Ademar, homoj, kiuj nevole instruis esperanton al mi per la reto aŭ per siaj verkoj. Mi ridis spektante la en esperanto subtitoligitajn filmojn tre amuzajn, kiujn Mateo kunportis de Eŭropo. Mi ĝuis la ciklajn dancojn, kiujn Leo el Lorena-SP instruis al la BEJK-anoj. Mi lernis iom pri montgrimpado aŭdante la prelegon de Karen, kiu kutimas kune kun Joe Bazílio surgrimpi la belajn montojn proksime de Formiga-MG.

Mi ridegis ĉe la ludo de la Miliono. Ivaldo (Natal-RN) organizis vendrede kvizon tre amuzan, kiu premiis per mono konvertebla al libroj en la libroservo tiujn, kiuj respondis korekte al demandoj faritaj de komputilo. La demandoj temis pri esperanto aŭ pri ĝeneralaj scioj. La "kandidato", kiu ne sciis la korektan respondon, povis elekti alian demandon por respondi, peti helpon de "universitatanoj", aŭ peti helpon de la ludkartoj, simile al la sistemo de la fama televida programo de Sílvio Santos. La "universitatanoj" estis komencantoj (!), elprenitaj de Ivaldo el la ĉeestantoj. Ankaŭ Advalk (Recife-PE) sin oferis kiel "universitatano" (tiu ĉi pro ironio foje ne donis la korektan respondon). La demandoj komence estis tre simplaj kaj eĉ ridindaj. Tamen se la kandidato sukcesis respondi la demandojn de la unuaj niveloj, li aŭ ŝi devis respondi progresive pli malfacilajn demandojn. Nur unu (Werneck el Rio de Janeiro) sukcesis atingi la lastan demandon, kiu donus kiel premion ekzempleron de Nova PIV (Plene Ilustrita Vortaro). La demando estis: kiom da literoj havas la unua frazo de "la Espero", la himno de Esperanto (En la mondon venis nova sento)? Werneck kuraĝis respondi, sed li eraris kaj tiel perdis la tutan monon, kiun li kolektis dum la ludo.

Mi havas multajn parencojn en Porto Alegre kaj kompreneble mi volis profiti la vojaĝon por ankaŭ viziti ilin (mi ne ĉeestis la artan vesperon pro tio). Ili ĉiuj loĝas en kvartalo Sarandi. En Sarandi mi ankaŭ havis la ŝancon vidi de proksime etajn domaĉojn faritajn el ne taŭgaj materialoj por protekti kontraŭ la vintro. Mi, kiu apenaŭ povis elteni la malvarmon en sufiĉe komforta kaj varmigita ĉambro ĉu en hotelo, ĉu ĉe miaj parencoj, ne povas imagi la suferon de homoj, kiuj por iom pli sin varmigi, devis meti ĵurnalojn sub siajn vestaĵojn.

Kiel bona esperantisto, mi kompreneble volis paroli ankaŭ pri esperanto al miaj parencoj - vi ne povas imagi kiom ili estas multenombraj! Ĉiu nova parenco, al kiu mi estis prezentita, demandis pri tio, kion mi faras en Porto Alegre kaj mi post sekundo denove eksplikis pacience, kiu estis Zamenhof, kio estas Esperanto kaj tiel plu.

Vi ĉiuj kiuj kongresis certe rimarkis iun simpatian malgrandulon kun impona ĉapelo de "cangaceiro" surkape, ĉu ne? Maurício kutimas uzi tiun ĉapelon, kiu estas tradicia en Cearao, dum ĉiu Kongreso de Esperanto, kiun li partoprenas. Do tiu ĉapelo havas historion ek de 1980, tio estas, antaŭ 25 jaroj. Krom kompetenta agronomo Maurício estas ankaŭ aktiva radioamatoro. Vi ĉiam povas vidi lin kun radioaparato surmane parolante al homoj el ĉiaj imageblaj lokoj, kie troviĝas esperantistoj: Varginha, Londono, Siberio, ktp, nur por mencii kelkajn. Vi povas eĉ esti certa, ke post la fina venko, li baldaŭ ankaŭ parolos kun e-istoj el Marso, Aldebarano kaj transe. Sed portempe li estis nur intervjuata de Givanildo Costa.



mienoj

## ZAKOPANE >

IJK 2005

Ruth el Portugalio, trinkas akvon por rehavi energion por la intensa IJK en Pollando



## PORTO ALEGRE >

BEIK 2005

Maurício el Cearao ĉiam portas surkape sian ĉapelon, kiu travivis la tutan historion de Esperanto en Cearao.



## HELSINKI >

KEF 2005

Marteno (el Slovakio) kaj Tali (el Israelo) ripozas post koncerto en la klubejo Liberté, dum KEF en Finnlando.






**ŜUPRE** | LA HUNGARA LINGVO, LA UNUSOLA LINGVO, KIUN LA DIABLO RESPEKTAS




# BEJK >

Ankaŭ mi havis mian momenton de famo. Okazis dum la kongresa fermo, sabate matene. Dum sekundoj la okuloj de la esperantistaro turniĝis al mi, kiam mi ricevis BEL-diplomon de la manoj de iu gravulo kun barbo kaj okulvitroj. Vi mem povos ekzameniĝi en la venonta kongreso en Campinas, se vi volos. Vi elektu vian nivelon: bazan, mezan, superan aŭ instruistan. Krom ricevi diplomon kaj aplaŭdojn de la amaso, vi ricevos ankaŭ kisojn de loka belulino (aŭ, se vi preferas, de gravulo kun barbo kaj okulvitroj, laŭ via plaĉo). Mi serioze pensas reekzameniĝi en Rio de Janeiro (ĉu Rozinjo legos tion?)

Sed mi volas diri (jes, kial ne?), ke mi amis la ĉuraskon gaŭĉan kaj la kongresajn tagojn, kiujn mi pasis en tiu bela kaj ĉarma urbo. Mi ne forgesos la novajn amikojn, nek la promesojn de Mateo sendi min per poŝto li-scias-kion :)

Dum la kongreso oni anoncis, ke la 28-a BEJK okazos en Fortaleza. Mi do nome de la cearaanoj invitas vin ĉiujn veni al la brilsuna Cearao en 2008 por amuziĝi ĉi tie dum la plej granda festo de la brazila esperantistaro. Tiuj, kiuj venis por la Universala Kongreso en 2002 jam povas imagi tion, kio atendos vin... Ni do persekutu la "bonan etoson" kaj ĝuos. Kaj, ho jes, mi preskaŭ forgesis: tute ne forgesu kunporti vian plej bonan bankostumon por protekti vin kontraŭ la varmo! Kaj kia varmo!












**AVENTURIS** | ROGENER PAVINSKI

# TRA LA PORDOJ DE LA
# FRENEZA DOMO >>>




***Komence de Junio publikiĝis esperanta traduko de la fama elektronika ludo Maniac Mansion (MM), kiu preskaŭ dudek jarojn post sia apero plu altiras admirantojn tutmonde. Sube, iom pri la historio de tiu mejloŝtona ludo kaj pri la naskiĝo de ties esperanta vesto.***

MM estis unue lanĉita de LucasFilm en 1987, por komputiloj, tiam en versio grafike tre primitiva, sed kiu enkondukis multajn novaĵojn ka popularigis novan ludstilon: tiun de la grafikaj "aventurludoj". En ili, plej gravas ne rapideco de movoj kaj agoj aŭ mortigo de la plej granda nombro de malamikoj, sed rezonado kaj solvado de enigmoj per speciala interfaco de verbaj komandoj al roluloj, kadre de tre engaĝaj kaj pensigaj historioj.

Ĝi naskis tre sukcesan serion da similaj ludoj kiuj vaste konatigis la entreprenon LucasArts kiel unu el la plej talentaj komputilludaj produktantoj de la mondo (LucasArts estis branĉo kreita iom post MM ekskluzive por ludoj, danke al la kreskanta populareco de la stilo, kaj kiu ankaŭ produktadas la ludojn de "Stelaj Militoj"). MM estas konsiderata de multaj kiel unu el la plej bonaj ludoj jam faritaj.

Mia unua kontakto kun ĝi okazis ĉirkaŭ 1993, per la versio por NES (Nintendo 8-bita). Mi tiam estis nur 12-jara, tre ludema knabo, kaj tiu ludo intense kaptis mian atenton sufiĉe longe. En 1994, kun amikoj, mi unuafoje sukcesis finplenumi ties enigmojn (per unu el la eblaj vojoj...:-) ).



La ludstilo tiom ravis min, ke ĝi fariĝis mia plej ŝatata: mi poste avide sekvis ĉiun novan lanĉon de LucasArts kaj de aliaj entreprenoj kiuj sekvis la fluon. De kelkaj jaroj, precipe pro mia esperantistiĝo, mi ĉesis regule sekvi la novaĵojn de la videoluda mondo, tamen mi konservas en la komputilo tiujn klasikajn ludojn por reludado okaze de resopiro (kelkajn mi ankoraŭ ne sukcesis fini! :-) ).

Gravas ke mi menciu ke Maniac Mansion reprezentis mian unuan plenan kontakton kun lingvaj problemoj: la ludo estis tute en la angla, lingvo tiam de mi apenaŭ eklernita ĉe la lernejo. Por ĉiu frazo aperinta surekrane, mi devis abunde konsulti vortaron. Mi povas aserti ke danke al tiuj ludoj mia anglalingva vortprovizo signife riĉiĝis...

Malgraŭ sia aĝo, MM daŭris adorata de legio da fanoj tra la jaroj... Kaj jen, meze de 2004, plurlanda skipo "LucasFan Games"** reprilaboris la tuton kaj disponigis la novan verkon senpage. Des pli bone, nun tradukita al multaj lingvoj kaj tradukebla al pliaj, laŭ la alvoko ĉe la paĝo de la projekto. Mi tiam estis sentempa, sed al mi fariĝis pli kaj pli nerezistebla la deziro traduki ĝin al Esperanto, precipe cele al komencantoj, sed kion nur Januare de 2005 eblis plenumi. De tiam, inter testoj, agordoj, atendadoj ktp, la tempo pasis, sed finfine ĝi alvenis al la publiko komence de Junio (mi aldonu ke, krom la esperanta, estis aldonitaj kune la tradukoj norvega, finna kaj nederlanda).

Sendube Maniac Mansion Deluxe estas la plej sukcesa fanluda reverkaĵo (remake) jam okazinta, inda je komparo al la pionireco de ĝia praulo. Eĉ la "patro" de la originala ludo (kaj de pluraj postaj LucasArts-ludoj), Ron Gilbert, gratulis la novan. Ĉirkaŭ 500.000 personoj elŝutis en unu jaro la versiojn kiuj antaŭis tiun kun la esperanta aldono (1.4). Kaj la elŝutado pluas, tra pluraj serviloj tutmonde.

Laste, gravas mencii ke mi kaŝis en la esperantan tradukon kelkajn aludojn al niaj kulturo kaj movado... Pli atentaj ludantoj certe ridetos, ekzemple, rimarkinte la adreson de la eldonisto kiu aperas ĉe televidilo... :-D

*Pliaj informoj pri la ludo estas troveblaj en la Marigdosiero (ankaŭ disponebla en E-o) kiu akompanas MMD (nepre!), aŭ ĉe:*

*- La kompleta novaĵo pri la lanĉo de la esperanta versio:*
*http://jimes.multiply.com/journal/item/14*

*- Vikipedio (angle):*
*http://en.wikipedia.org/wiki/Maniac_Mansion*

*- Elŝutu la ludon ĉe:*
*http://www.filefront.com/?filepath=/Adventureserver/fanadventures/mmd14setup.exe*




RAPORTIS | JIMES MILANEZ